# Esperanto en Danio

**19-a jarkolekto • n-ro 4 • oktobro 2012**

ESPERANTO

125

1887-2012

# Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124



**Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t



**Kromaj estraranoj:**

Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Peter Wraae



**Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk



**Presado:**

DDFO

**Adresŝanĝoj al:**

La prezidantino (adreso supre)



Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.



Limdato por la venonta numero:

**01.12.2012**


## Enhavo


Fruktodonaj atingoj....3
Paperaj gazeteltondaĵoj....4
Kopenhago....4
Næstved....7

Forpasis Zofia Banet-Fornalowa....8
Informo....8
Esperanto estas facila....9

Strategia bazo por UEA....12
EspoDespo en kultura haveno....27
Esperantistoj gustumis la mondon..28

# Fruktodonaj atingoj



Jen, alproksimiĝas la fino de la jubilea jaro 125, sed restas ankoraŭ kelkaj atingoj por finfari. Unu el la sufiĉe gravaj estas nia partopreno ĉe la Libroforio (Bogmessen) en Bella Centro la de la 9-a ĝis la 11-a de novembro. Ĝuste por marki la jubilean jaron ni escepte partoprenas tiun tre multekostan eventon, kaj ni invitas niajn membrojn kiuj intencas partopreni la foiron, viziti nian budon sabate la 10-a de novembro posttagmeze por festi la jubileon ĉe la budo.

La ĝisnuna agado kunportis jam fruktodonajn atingojn. La 17-an de septembro komenciĝis kurso por komencantoj en Kopenhago kun 11 partoprenantoj, la Klubo de Ålborg havas 5 partoprenantojn al sia kurso, kaj ni ĵus spertis ke nia membro Thomas Lytie, kiu instruas en la gimnazio de Rønde, interesigis 7 el siaj lernantoj pri nia lingvo kaj komencis la instruadon. Tiuj atingoj estas sendube la rezulto de nia informa agado pri la jubileo kaj pruvas ke plia informa agado atingas rezultojn.

Mi atentigas niajn legantojn pri la nova celaro de UEA, verkita de la strategia komisiono. Grave estas por ĉiu organizo de tempo al tempo revizii sian celaron por aktualigi kaj modernigi ĝin al aktuala vizio. La Komisiono komencis sian laboron antaŭ 2 jaroj kaj ni diligente kaj persiste laboris kaj diskutis la diversajn proponojn ĝis la nuna publikigo de niaj rezultoj. Estas dezirinde ke la membroj mondskale diskutu la enhavon kaj komentu. Tiucele vi trovos en ĉi tiu numero la strategian celaron. En Kopenhago ni diskutos la celaron en unu el la venontaj kunvenoj, sed bonvenaj estas ankaŭ rimarkoj sendataj al nia retadreso dea@esperanto.dk.

*Ileana Schrøder*

# Paperaj gazeteltondaĵoj

| | |
|---|---|
| Majo 2012: | Jernbanefritid: IFK – en flot uge i maj. |
| Junio: | Jernbanefritid: Årets gang i esperantoforeningen. |
| 01.08.: | Sjællandske: Esperanto burde erstatte engelsk, intervjuo kun E Henning Olsen okaze de la 125-jariĝo de Esperanto (menciita en EeD n-ro 3). |
| 07.08.: | Ugebladet, Næstved: Asocia registro, i.a. EUN. |
| 07.08.: | Politiken, læserne mener: ”Et dejligt modersmål”, ironia legantletero de Ulla Truelsen, Sorø |
| 12.08.: | Nordjyske Stiftstidende: På vej mod Babelstårnet, intervjuo kun Annette Holck |
| Aŭgusto: | Esperantlingva enmetaĵo en programo pri ekspozicio de Næstved Kulturforening |
| 8.-9. sep: | Anonco en Information pri debataranĝo pri virinoj en Afganio; inter la aranĝantoj DEA menciita |
| 20.09.: | Aranĝokalendaro de FN-forbundet: Mencio de la supra aranĝo |

Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, kaj nun – okaze de la 125-jariĝo de Esperanto – devus aperi amaso da artikoloj.

# Kopenhago

La kunvenoj de KEK komenciĝas je la 19-a kaj finiĝas je la 21-a. La adreso estas: Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV. Cetere la kluba programo legeblas ĉe la Facebook-grupo ‘Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo’. La kluba kontaktulo estas la prezidanto: Betty Chatterjee +45 38 89 10 13 chatterjeebetty@hotmail.com

### *Programo ĝis novjaro*

**Oktobro** la 8-an: Studvespero. En marto 2012 UEA aperigis dokumenton pri Strategia vizio por UEA, legeblan ĉi-numere. Jen leginda kaj diskutinda plano, kiun ni povos studi kaj pripensi.

15-an: La arto de aŭskultado. Betty prezentos sondosierojn de Anton Obendorf kaj aliaj eminentaj parolantoj de Esperanto.

22-an : Unuiĝintaj Nacioj. La 24-a de oktobro estas Tago de U.N. Debatvespero laŭ la temo: 'Ĉu la Esperanta movado faris, faras, faros kontribuojn utilajn por la agado de UN?'. Ileana gvidos la vesperon.

29-an: Junulara vespero. Informoj sekvos.

**Novembro** la 5-an: Lene kaj Jan Niemann prelegos pri sia vojaĝo al Laoso.

12-an: Ni parolu pri 98-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko -Islando.

19-an: Jørgen Maniche proponis, ke ni denove spektos la filmon de Sam Green 'La Universala Lingvo'. Do ni spektu kaj pridiskutu ĝin.

26-an: Junulara vespero. Informoj sekvos.

**Decembro l**a 3-an: Prelego. Informoj sekvos.

10-an: La 15-a de decembro estos ne nur la naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. Estas kaj i.a. la tago de la libro. Dum la Z-a festo vi povos aĉeti librojn. Kiuj libroj laŭ via opinio estos aĉetindaj, kaj kial? Ni konsilu unu la alian. Eble ni ne ĉiam konsentiĝas pri la konsiloj, tamen do ni ekzercos la arton de diskutado.

15-an: Zamenhofo-festo.

### *Iom pri KEK-a ekskurso al Sveda arbaro*

Survoje al la elirpunkto de nia ekskurso mi legis la jenan frazon de la romano "Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo", verkita de Tibor Sekelj: "La maljuna indiano Maloa diris: 'Fungojn kolektu post pluvo, bestojn ĉasu frumatene!'"

Kiel konvene! Ĉar ni estis dek kopenhaganoj kiuj ekskursis al Svedio, por ke ni vizitu du svedajn esperantistojn, kune kun kiuj ni penos kolekti fungojn en arbaro proksime de ilia hejmo. Ĉu mankas al ni arbaroj en Danio? Ne, sed la

svedaj arbaroj estas pli vastaj, pli defiaj kaj pli sovaĝaj ol la danaj. Mi kuraĝas iom troige diri, ke tie mi, kaj eble aliaj, povas imagi travivaĵojn en malproksima praarbaro, kiun verŝajne ni neniam spertos.

Tri tagojn antaŭ la ekskurso Ursula, unu el nia gastigantoj, skribis al mi, ke ŝi dubas, ke ni trovu fungojn en la arbaro, ĉar pro manko da pluvo la arbaro estas seka. Sed tagon antaŭ la ekskurso pluvegis, tial legante la aserton: "Fungojn kolektu post pluvo", mi demandis min, ĉu la saĝeco de Maloa ankaŭ taŭgas en Svedio?

Laŭ niaj hieraŭaj spertoj jes! La fungoj amasiĝis en la arbaro.
Planinte la ekskurson pluraj amikoj avertis nin pri venenaj fungoj, kaj ni iomete nervoziĝis pri la konsekvencoj. Tamen ni estis singardaj.

Ursula, Michaelo kaj Zita estas spertuloj pri fungoj, kvankam ili ne ĉiam akordiĝis pri la bonaj kaj la malbonaj specoj. Tial ni decidis kolekti tiujn, kiuj estis aprobitaj de ĉiuj spertuloj. Post duhora plezura vagado en la arbaro ni revenis al la hejmo de Ursula kaj Tomaso, kie post la manĝado de bongusta ruĝbeta supo kaj la lernado kaj kantado de kanto pri fungoj ni eklaboris. La ĉefa fungospertulo diplomita, Mikaelo kontrolis la rikolton, tiun Zita rekontrolis kaj lavis. Post tio mi tranĉis la fungojn kaj Ursula fritis ilin,

Finfine ni manĝis la bongustan pladon. Cetere kvankam ni multe ŝercis pri lastaj komunioj, testamentoj ktp, hodiaŭ, almenaŭ laŭ mia scio, ĉiuj partoprenintoj bone fartas.

P.S. Se vi volus aŭskulti la kantadon, spektu la jenan videon.
http://www.youtube.com/watch?v=OZFU1SGGjyU&feature=player_embedded
aŭ vizitu la jenan http://rosejo.blogspot.dk/2012/09/fungojn-kolektu-post-pluvo.html.

*Betty Chatterjee*



## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝo-horoj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj.

***Okazos:***

Kiel nun kutime ni nun kunvenas en mardojn, kaj precipe en la post-tagmezoj, sed atentu: la posttagmezaj kunvenoj estonte komenciĝos je h 13.30, ĉar tio pli konvenas al plej multaj partoprenantoj.

Ma 09.10. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ma 23.10. je h 13.30: Studado de la libro H C Andersen en la Oriento + konversacio

Ma 06.11. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ma 13.11. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ma 20.11. je h 13.30: Ni spektos malnovajn lumbildojn

Ma 27.11. je h13.30: Studado de HCA en la Oriento + konversacio

Ma 04.12. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ma 11.12. je h 13.30: Jularanĝo. Ni manĝetos frandaĵojn, ekz. fromaĝojn, trinkos ruĝan vinon aŭ aliajn trinkaĵojn kaj spertos ujutnan etoson, ĉio je kosto de po 20 DKK.

Datoj de postnovjaraj kunvenoj ne estas finfiksitaj.

***Okazis:***

Sabaton la 4-an de aŭgusto je h 13a kolektiĝis membroj kaj invititoj en nia kunvenejo por celebri la 35an datrevenon de Esperanto-Unuiĝo de Næstved. La prezidanto de DEA, s-ino Ileana Schrøder, la prezidanto de KEK, s-ino Betty Chatterjee kaj la sekretario de DEFA, s-ino Lene Niemann salutis per belaj vortoj. La unuiĝo regalis per abunda bufedo kaj estis disdonata kajero kun krokiza priskribo de aktivecoj tra la 35 jaroj de ekzisto. Agrabla posttagmezo.

25.09. La unua studado de la sezono kun lasta uzo de Faktoj kaj Fantazioj.

## Forpasis Zofia Banet-Fornalowa



Zofia Banet-Fornalowa estis grava historiisto de nia movado, kun aparta atento pri ĝia rilato al la ekstera mondo. Etna judino, ŝi naskiĝis en Varsovio 1929, kaj mirakle eskapis el la Holokaŭsto. En 1954 ŝi magistriĝis en la Varsovia Universitato per la disertacio "Kleriga sistemo de minoritatoj en Pollando en la jaroj 1918-1939". Dum kvarono de jarcento ŝi instruis historion en mezlernejo kaj inter 1954 kaj 1956 ŝi laboris en la Vroclava Universitato.

Zofia Banet renkontis esperanton en 1963 kaj tuj ekaktivis en la pola Esperanto-movado, atingante gravajn postenojn. Sed ŝi plej fieris pro la gvidado de Teatro Espero Varsovio, kie rolis ŝia edzo, Jerzy Fornal, talenta aktoro. Li faris prezentadojn interalie ĉe diversaj renkontiĝoj de la Esperanta Civito, de kiu ŝi estis unu el la fondintoj. Ankaŭ Karlskoga Popolaltlernejo kaj Esperanto-Gården en Svedio kaj la danaj Esperanto-kluboj ofte povis ĝui lian aktoradon.

Ŝi verkis plurajn librojn precipe pri historio kaj teatro, kun aparta intereso pri tri grandaj varsovianoj: Antoni Grabowski, Janusz Korczak kaj Ludoviko Zamenhof. Aparte grava estas ŝiaj biografioj, ekzemple "La familio Zamenhof", eldonita de LF-koop. Ŝi kunlaboris al ĉiu periodaĵo de la kooperativo.

Ŝia verko pri la familio Zamenhof estas la plej ampleksa studo pri la temo, verkita per la kompetenteco de historiisto kaj per la pasio de pola judino. Ŝiaj verkoj (ĉiuj aĉeteblaj ĉe UEA) estas vera riĉigo de la menso.

*[laŭ Carlo Minnaja, Probal Dasgupta kaj Kaisa Hansen]*

## Informo

Novaj sondosieroj (elŝuteblaj) de/pri Prof. D-ro Ivo Lapenna en la hejmpaĝo de Fondaĵo Ivo Lapenna okaze de la 125-jara datreveno de Esperanto.
http://www.ivolapenna.org/125.htm (plej bone per Internet Explorer).

# Esperanto estas facila



Tiel ni ĉiam prezentas la lingvon en niaj propagandiloj, ĉu ne? Fiere ni ilustras, kiel eblas krei tutan serion da vortoj surbaze de la sama radiko: ĉevalo, ĉevala, ĉevale, ĉevalino, ĉevalido, ĉevalejo; bela, bele, beleco, belulo, beli, beligi; unu, unua, unuo, unueco, unuiĝo, unuigi – kaj kontrastas tion kun la neregulaj kaj pluroblaj radikaroj de aliaj lingvoj.

Kiel ĉiu artisto scias, simpleco ne estas facile akirita. Poeto ŝvitas dum horoj, fortajlante nenecesajn vortojn, ĝis restas nur unu perfekte tornita frazo. Simile, Zamenhof laboris dum pli ol jardeko por atingi ĉefverkon de simpleco.

La facileco de Esperanto efektive estas motivo por lerni ĝin; tial, cetere, mi mem ekinteresiĝis pri ĝi. Ĝia facileco tenas la entuziasmon de lernantoj, kiuj rimarkas post malmultaj lecionoj pli grandan progreson ol eblus eĉ post plurmonata studado, se ili lernus alian lingvon.

Unu el la plaĉaj aspektoj por novaj esperantistoj estas la ebleco mem krei vortojn: ne per enkonduko de novaj radikoj, sed per kombino de ekzistantaj radikoj kaj uzo de sufiksoj. Kiel instruisto mi rimarkas, ke komencantoj aparte ĝuas la lecionon pri la mal-vortoj: ili malkovras kun plezuro, kiel lerninte longa, nova, juna ktp. ili mem povas krei mallonga, malnova, maljuna.

Esperanto havas la aspekton de latinida lingvo, kaj tial parolantoj de tiuj lingvoj tro facilanime emas enkonduki novajn vortojn. Se oni ne scias, ekzemple, kiel diri *illegal* aŭ *editorial*, estas multe pli facile diri *ilegala* aŭ *editorialo*, ol cerbumi kiel plej trafe esprimi tiujn konceptojn en Esperanto. Mi kredas, ke alta proporcio de la vortoj, kiuj plenigas niajn vortarojn, ekaperis en la lingvo pro nepensemo de parolantoj. Tiel ili faciligas la lingvon por si mem, sed ne nepre por siaj legantoj aŭ aŭskultantoj. Por ke Esperanto retenu sian simplecon, necesas pensi.

Aliaj vortoj aperis tutsimple pro eraroj. Kiam amaso da homoj,

ekzemple, kune marŝas tra la stratoj por fari politikan proteston, tio estas manifestacio. Por parolantoj de eŭropaj lingvoj, estas tro facila eraro nomi tion demonstracio – tiun vorton mi eĉ foje vidis en revuo Esperanto (ne lastatempe, sed antaŭ 10-15 jaroj). Por eviti tiajn erarojn, necesas kontroli en vortaro, kiam oni ne certas pri vorto, anstataŭ senpripense supozi, ke oni jam scias. Mi memoras, kiel mi mem, kiel nesperta sed tre entuziasma esperantisto, preskaŭ skribis la vorton parmezano sur mian aĉetliston. Poste mi pensis, ke tamen estus bona ideo kontroli en la vortaro, kaj malkovris, ke tio nomiĝas en Esperanto parma fromaĝo (t.e. fromaĝo el la urbo Parma). “Ha, kompreneble!” mi pensis. “Kiel bonŝance, ke mi kontrolis!” La problemo estas ne nur, ke nespertuloj ne kontrolas, sed ke poste la vortaroj reprenas kaj disvastigas iliajn erarojn. Alia granda fonto de tiaj eraroj estas Vikipedio, en kiu nun ja aperas la kapvorto Parmezano. Konsiderante la fakton, ke tiu itala fromaĝo nomiĝas en la itala *parmigiano*, tiu angla-franca formo vere ne havas sencon.

Neniu normale provus aldoni novan radikon al nature evoluinta lingvo, sed ĉar Esperanto estas artefarita, eĉ komencantoj opinias, ke ili rajtas kaj povas plibonigi la laboron de Zamenhof. Mi legis iam proponon pri nova vorto ekvila en la kunteksto ekvila komerco. Kiel Esperanto elturniĝis dum la lastaj 120 jaroj sen la vorto ekvila? Tre simple: per la vorto justa. Tiun ekzemplon vi ne trovos en la paĝoj de La Bona Lingvo (bonŝance tiu propono estis mortnaskita), sed amason da aliaj: *cis, humanitara, violenta* ktp. ktp.

Iuj esperantistoj opinias, ke ili rajtas proponi ŝanĝon al la vorttrezoro tutsimple ĉar ili ne ŝatas ekzistantan vorton, kaj pensas, ke alia formo estus pli bona aŭ pli bela. Tiel, apud la Fundamentaj vortoj kruro, besto, vinbero kaj presi aperis *gambo, animalo, uvo* kaj *printi*. La ĉiama preteksto estas, ke estas iu esenca distingo en la signifo: ekzemple, ke kruro rilatas nur al la parto inter la piedo kaj la genuo, dum gambo estas la tuto; aŭ ke animalo rilatas al ĉiuj bestoj inkluzive de la homo. La praktika (kaj certe ankaŭ la celita) rezulto estas iompostioma anstataŭigo de la Fundamentaj vortoj per aliaj pli laŭ la gusto de ties uzantoj. La sekvo estas, ke anstataŭ lerni nur unu vorton, komencantoj devas lerni du kun praktike la sama signifo – ĉar kompreneble la malnova formo ne falas el la uzado. Kien do malaperis la

facileco de Esperanto?

Por lernantoj de Esperanto estas tre kuraĝige konstati, ke ili mem povas per kombinado de radikoj kaj sufiksoj multobligi sian vorttrezoron. Bedaŭrinde, iuj esperantistoj kredigas al ili, ke tiaj kunmetitaj vortoj ne estas serioza parto de Esperanto, ke ili apartenis al primitiva fazo de la lingvo, nun superita. Tiun vidpunkton mi iam aŭdis ankaŭ de nesperta esperantisto: ŝi plendis, ke ŝi ne havas sufiĉe grandan vortprovizon en Esperanto – jes, ŝi scias, ke eblas mem krei vortojn, sed ŝi volas lerni la "ĝustan" nomon de la koncerna objekto. Evidente, ŝiaj instruistoj jam konvinkis ŝin, ke la kunmetaĵoj, kiujn ŝi mem elpensas, estas duarangaj anstataŭaĵoj, uzindaj nur se oni ne konas la "veran" terminon.

Ni ĉiuj konas la faman rakonton pri la eta Ludoviko kaj la dolĉaĵvendejo: ke vidante la rusan vorton *konditorskaja* (sukeraĵejo) li ekkomprenis, kiel per sistemo de afiksoj li povos limigi la bezonatan radikaron de sia nova lingvo kaj tiel faciligi la taskon de lernantoj. Ĉu ne plu validas tiu brila inspiro de Zamenhof? Ŝajne ne – precipe dum ĉiu duonbakita duon-komencanto kredas, ke li aŭ ŝi rajtas proponi aldonojn al la vortaro. Tiel ekestas situacio, en kiu la radikaro konstante kreskas, kaj lernantoj estas devigataj dediĉi horojn por studi ĝin. Tion sugestas ekzemple la paĝaro *Lernu!* per sia rubriko "Vorto de la tago", kiu rekomendas amason da nenecesaj vortoj: *lokalizi, delico, akomodi, fetoro, sukuri* ks.

Kunmetado estas la ĉe la kerno de la esperanta vortfara sistemo. Ni ne donu al komencantoj listojn de novaj vortoj parkere lernendaj; anstataŭe ni montru al ili, kiel surbaze de malgranda radikaro, ili povos mem esprimi preskaŭ ĉiujn normale bezonatajn konceptojn.

*Anna Löwenstein*



*Tri el la naŭ sukcesintoj en la KER-ekzameoj de la 9-a de junio fiere prezentas siajn atestilojn.*

# Strategia bazo por UEA

**Konciza diskutdokumento de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj (aŭgusto, 2012).**

*En aprilo, 2012, la Komisiono pri Strategiaj Demandoj publikigis 15-paĝan analizon pri la strategiaj bezonoj de UEA. Intertempe venis diversaj reagoj al la dokumento, interalie dum la Strategia Forumo ĉe la 97a UK en Hanojo. La nuna, pli konciza kaj reviziita dokumento celas antaŭenigi la diskuton, dum la Komisiono plulaboras pri konkretigo de la strategiaj prioritatoj sur diversaj laborkampoj.*

## *1. Celo de la dokumento*

1.1. UEA estas baze volontula organizaĵo. Tial ĝia strategio devas eduki, inspiri kaj gvidi, sed ne povas devigi. Efika strategio devas inkluzivi vizion, strukturon kaj programon kiuj allogas kunlaborantojn, kaj oni devas investi pli da tempo kaj atento en komunikadon kaj kundiskutadon, ol necesas en hierarkia kunteksto.

1.2. Tiu ĉi dokumento do celas prezenti ĝeneralan kadron por la strategio de UEA, kun la celo stimuli tian kundiskutadon. Por resti konciza kaj facile trarigardebla, ĝi ne multe traktas la praktikajn detalojn; tiujn oni povos trovi en strategia laborplano pretigota antaŭ la 98a UK en Rejkjaviko.

## *2. Celaro*

2.1. La kultura, komunika, interhoma potenco de Esperanto estas tre multfaceta kaj plurnivela. Ne eblas ĝin komplete resumi en kelkaj frazoj. Tamen ni devas provi fari tion, unuflanke por klarigi nian agadon al homoj, kiuj scias malmulte pri Esperanto, aliflanke por kontribui al pli fokusita strategio kaj memkompreno inter la esperantistoj mem.

2.2. Por tiu celdifina flanko de la strategio, la Manifesto de Prago restas fundamenta. Neniu alia celdeklaro de la lastaj jardekoj rikoltis tiel vastan reeĥon de la membroj, nek ampleksas tiel vastan gamon de temoj. Eble oni povus resumi tiun ĝeneralan direkton kiel agado por “lingva justeco” aŭ por “justa, paca kaj daŭripova komunikado en multlingva mondo.”

2.3. Necesas tamen pli tuje komprenebla celdeklaro, kiun oni povus kompari kun la celdeklaroj de aliaj konataj internaciaj asocioj, kiel Amnestio Internacia pri homaj rajtoj aŭ Monda Fonduso por la Naturo pri ekologia politiko. En tiu kunteksto, ni proponas jenan vortumon, kiu atentas la individuan, socian kaj kulturan dimensiojn de la agado de UEA:

(a) Ni laboras por ebligi al ĉiuj homoj tutmonde komuniki, kunlabori kaj kleriĝi facile, efike kaj libere.

(b) Ni laboras por la evoluigo de socioj, kie ĉiuj homoj ĝuas samajn rajtojn, respekton, kaj ŝancojn sendepende de siaj denaskaj lingvoj,

(c) Ni laboras por konstrui inkluzivan tutmondan kulturon de paco, homaj rajtoj kaj daŭropova evoluo, gardante kaj protektante la plenan diversecon de lingvoj kaj kulturoj.

(ĉ) Ni kredas ke mondvasta uzado de la internacia lingvo Esperanto grave kontribuas al tiuj homaraj celoj.

### *3. La kernaj agadkampoj*

3.1. Strategio devas baziĝi sur klara bildo pri la amplekso de la programo de UEA. La Komisiono venis al nova, kvaropa etikedaro por la ĉefaj agadkampoj de la Asocio: **konsciigo**, **kapabligo**, **komunumo**, kaj **kunordigo**.

3.2. *Konsciigo* aludas al ĉiuj manieroj prezenti la realaĵojn kaj la valorojn de la Esperanto-komunumo al homoj, kiuj ankoraŭ ne kapablas sperti ilin persone. Veki intereson aŭ simpation pri Esperanto, ĝiaj historio kaj idearo; pensigi pri la realeco de lingvaj baroj kaj malegalecoj en la nuntempa mondo: prezenti ion interesan el nekonata kulturo (menciante la rolon de Esperanto en la perado); inviti al partopreno en difinita kurso aŭ aranĝo – tiuj estas ekzemploj de praktika konsciiga laboro. Nepras trovi novajn manierojn ĝenerale altigi la nivelon de la konsciiga laboro, tiel ke la malfortaj landaj kaj lokaj movadoj lernu de la fortaj (kaj inverse), kaj la novaj aktivuloj lernu de la malnovaj (kaj inverse). En tia tutmonda kunagado, UEA devas ludi kernan rolon.

3.3. *Kapabligo* kovras ĉiujn agadojn, kiuj celas helpi la homojn partopreni

pli aktive kaj profunde en la vivo de la komuumo. Temas ne nur pri instruado de la lingvo je diversaj niveloj, sed ankaŭ pri kultura kaj interkultura klerigado, kaj pri aktivula trejnado diversspeca kaj diverscela. Grandparte, tiu kapabligado okazas en neformalaj kadroj, ekster la sistemoj de ŝtataj lernejoj, universitatoj, profesiaj kursaroj ktp. Pli kaj pli ofte, ĝi okazas almenaŭ parte per Interreto. Historie, tiu agado ne okupis centran lokon en la strategio de la Asocio; estonte, ĝi devos.

3.4. *Komunumo* konsistas en la kompleksa reto de interhomaj rilatoj, kulturaj tradicioj, organizoj, aranĝoj, komunikiloj kaj tiel plu, kiuj donas al Esperanto ĝian vivon. UEA ne estas identa kun tiu komunumo, sed kiel la plej granda kaj inkluziva tutmonda asocio de esperantistoj, ĝi ludas tre gravan rolon en ĝi, praktike kaj simbole. La graveco de UEA fontas el ĝia kapablo arigi grandan nombron da homoj el multaj landoj kaj el ĝia atingo de alta nivelo organiza, lingva, kultura kaj intelekta. Ĉiuj strategiaj prioritatoj devus mezuriĝi laŭ ilia kontribuo al tiuj kapabloj.

3.5. Per tio ni venas al la kvara agadkampo, *kunordigo*. En la diverseco de la Esperanto-movado kuŝas granda forto, sed ankaŭ signifaj baroj al komunikado kaj kunlaboro. Certagrade, la sukceso de UEA kuŝas en ĝia kapablo enteni diversajn konkurencajn vidpunktojn kaj tendencojn. Tial tre gravas la komunikaj fluoj en la Asocio, la travidebleco de la decidoj, la efikeco de la strukturoj, kaj la reputacio de la gvidantoj. Tiurilate la publikaj postuloj multe kreskis en la lastaj jaroj. Venis tempo por funda repripensado de niaj organizaj formoj kaj tradicioj, cele al asocio pli malfermita, inkluziva, kaj efika.

3.6. Ĉiu agadkampo konsistas el pluraj specoj de agado, kiujn oni povas organizi per diversaj rimedoj. Tiel, la nova strategia laborplano de UEA devos esti plurnivela. Je la plej ĝenerala nivelon, oni bezonas superrigardon kaj vizion. Je la dua nivelo, ĉiu agadkampo ricevu apartan, pli detalan priskribon, kiu analizas la organizajn rimedojn, prioritatojn, kaj bezonatajn investojn. Je tria nivelo, necesas laborplano por la unuopaj instancoj, kiuj kunordigas la agadon je internacia nivelo. Je kvara nivelo, necesas atenti la konkretajn bezonojn en difinitaj landoj, la diversajn manierojn en kiuj individuoj povas aktive kontribui, la tempoplanon por

difinita jaro, kaj simile. En ĉi tiu dokumento ni traktas precipe la unuan el tiuj niveloj, sed ni donas ankaŭ iomete pli detalan priskribon de la diversaj agadkampoj en sekcioj 6 (Konsciigo), 7 (Kapabligo), 8 (Komunumo), kaj 9 (Kunordigo).

### *4. Kreskigo de la membraro*

4.1. UEA dependas grandparte de kotizoj kaj donacoj por financi sian agadon, kaj do la kreskigo kaj aktivigo de la membraro, individua kaj asocia, estas baza elemento de ĝia strategio.

4.2. Rigardante la kvar agadkampojn tra tiu lenso, oni vidas, ke ili kune konsistigas vojon por konduki homojn el la ĝenerala publiko al aktiva partopreno en la Esperanto-komunumo. Necesas emfazi, ke tiu ĉi ne estas io aparte de la "movado."

La multflanka kultura agado de nia komunumo ne nur donas spiritan kontentiĝon, sed ankaŭ vekas intelektan intereson, kaj pruvas kaj disvolvas la esprimpovon de Esperanto. La agadkampo Komunumo celas subteni kaj evoluigi tiujn flankojn de la movado. Tamen, sukceso sur tiu kampo dependas ankaŭ de la alfluo de novaj aktivuloj kun la bezonataj lingvaj kaj aliaj kapabloj – la celo de la agadkampo Kapabligo. Siavice, motivi la homojn fari la necesan investon de tempo, mono kaj energio por kapabliĝi estas la esenco de la kampo Konsciigo. Do, UEA ne rajtas neglekti aŭ elstarigi unu el tiuj tri kampoj: ili estas partoj de unueca kaj dinamika tuto, kiun ĝi provu fari pli kohera, harmonia kaj efika enkadre de la agadkampo Kunordigo.

4.3. Dinamika estas ankaŭ la rilato inter UEA kiel asocio de individuaj membroj kaj UEA kiel koalicio aŭ federacio de landaj asocioj. La strategio devas funkcii je ambaŭ niveloj; t.e. ĝi devus rezulti ankaŭ en pli aktivaj kaj fortaj landaj asocioj, ne nur en UEA kun pli granda kaj vigla individua membraro. Tio signifas, ke ĉiu landa asocio devos pensi pri sia strategio sur la kvar agadkampoj, ĉar la argumentoj de la antaŭa paragrafo validas ankaŭ landnivele. "Aliĝo" al UEA nun estas esence formala paŝo, kiu donas al landa asocio kun pli ol 100 membroj la rajton je komitatano A, sed ne difinas pli strikte ĝiajn respondecojn. Imagu, se ĉiu landa asocio

devus formale deklari la kampojn, sur kiuj ĝi volas kunlabori, kaj ĉiujare raporti pri sia agado sur tiuj kampoj en rilato al la strategia plano de UEA. Tio estus unu maniero atingi pli da kohereco en la agado kaj pli bonan informfluon inter la diversaj asocioj. Same klaraj devus esti la respondecoj de la internacia asocio por konkrete helpi la landajn asociojn, por ke la rilatoj kaj la sindevigoj ne estu nur unudirektaj.

### *5. La graveco de Interreto*

5.1. La klasikaj aliroj al strategia planado emfazas la pritaksadon de "ŝancoj kaj minacoj" en tiuj sferoj de la socia vivo, kiuj plej rekte tuŝas la agadon de la organizo. Tio estas tre malfacila defio en la kazo de tutmonda asocio kiel UEA. Nuntempe, tamen, unu faktoro klare elstaras tutmonde: la disvastiĝo de Interreto. Dum la tuta ekzisto de la lingvo, neniu teknika inventaĵo aŭ socia transformiĝo havis tiel profundan efikon sur ĉiuj agadkampoj kaj en ĉiuj landoj. Ĝi do meritas sisteman atenton kaj krean utiligon en ĉiuj aspektoj de nia agado.

5.2. Aliflanke, kompreneble, ni devas gardi nin kontraŭ la tento obsediĝi de la reto, kvazaŭ niaj problemoj estus solveblaj per ĝusta apliko de teknika scio. En la fina analizo, Esperanto estas afero de homaj rilatoj, homaj deziroj kaj esperoj, homaj streboj, kaj la reto estas nur rimedo (aŭ rimedaro) por ties plenumo. Tial necesas pensi ne nur pri tio, kion ni povas atingi per la reto, sed ankaŭ kion ni *ne* povas atingi, aŭ povas pli oportune atingi per aliaj rimedoj.

5.3. Tiun konstaton la Komisiono enkonstruis en sia traktado de la kvar agadkampoj. Sur ĉiu kampo ni demandis nin, kion ni povus atingi en la venontaj kvin jaroj – kio estas la celinda vizio, kaj kiuj estas la plej prioritataj paŝoj, kiuj kreos bazon por postaj atingoj? Kaj poste: kiel plej bone uzi la reton kadre de tiuj prioritatoj? Tial sur ĉiu agadkampo oni trovas kvazaŭ du kolonojn de la strategio, unu retan, unu pli ĝeneralan. Ilin oni devas trakti kune, ne dise, ĉar unu devus apogi la alian (aŭ, se vi preferas arkitekturan bildon, ambaŭ necesas por porti la strategian arkon).

#### *6. Agadkampo Konsciigo*

6.1. Eblas difini multajn ŝtupojn de la agado por Konsciigo, ekde ĝenerala

publika akcepto de la lingva kaj kultura realeco de Eperanto ĝis profunda konvinkiĝo pri ĝia valoro por individuoj kaj socioj. Komuna inter tiuj ŝtupoj estas la bezono de (a) ĝisdataj kaj gustaj informoj pri la Esperanto-movado tutmonde, (b) klereco pri lingva komunikado kaj lingva diverseco, kaj (c) kono de metodoj kaj strategioj de informado, merkatiko, kaj lobiado.

6.2. La unua bezono (a) klare indikas la kernan rolon, kiun la reto devas ludi sur ĉi tiu kampo. Tial nia unua rekomendo koncernas la kreon de nova Reta Komisiono pri Informado (ReKI), kiu celus kunlaborigi la plej aktivajn homojn landnivele kaj internacie kadre de komuna retpaĝaro (eventuale renovigita esperanto.net). ReKI kolektus, evoluigus kaj disponigus praktikajn rimedojn por la informa agado en kiel eble plej multaj lingvoj, simile kiel la paĝaro edukado.net subtenas la laboron de instruistoj. ReKI respondecus ankaŭ pri la ellaboro de trejnprogramo responde al bezono (c). La celo estus kultivi komunumon de centoj aŭ miloj da kunlaborantoj, provizante ilin ne nur per bonaj materialoj kaj fidindaj informoj kaj argumentoj, sed ankaŭ per trejnado pri ĵurnalismo, retpaĝa redaktado, lobiado, reklamado, kaj simile.

6.3. Dum ReKI celus subteni amasan informan agadon, restus grava rolo por la Centro por Esploro kaj Dokumentado (CED. Kiel organizo por lingva justeco, UEA nepre bezonas organon kiu okupiĝas pri lingvopolitiko en vasta senco, kapablas respondi en informita kaj trafa maniero al evoluoj en la publika aŭ interregistara sferoj, kaj povas antaŭenpuŝi la pensadon pri tiuj demandoj en- kaj ekstermovade. Ni do proponas doni al CED pli centran lokon en la strategio de UEA, kun respondeco i.a. pri la ellaboro de aktualaj studoj kaj argumentoj kun bazo en la faka literaturo kaj en la agado de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj. La propono ellabori “indekson de lingva justeco,” nun prilaborata de internacia laborgrupo, povus aldoniĝi al tiu taskaro. Tio signifus ĝisfundan reorganizon de CED por ligi al ĝi pli da lingvistoj kaj aliaj fakuloj, disponigi al ĝi modestan buĝeton, kaj disvolvi ĝian kapablon akiri ekstermovadajn subvenciojn por konferencoj kaj aliaj agadoj.

6.4. En la ĉi-suba tabelo, ni resumas tiujn ideojn, kun iuj tre skizaj sugestoj

pri konkretaj celoj por kvinjara periodo (laŭ la principo SMART: specifaj, mezureblaj, atingeblaj, realaj kaj trafaj). En strategia laborplano, ĉio ĉi estus multe pli detale ellaborita, por povi gvidi la laboron de diversaj aktivuloj kaj organizoj.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KONSCIIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:**<br>CED/Reta Komisiono pri Informado | **Strategia vizio:**<br>UEA – portanto de Esperanto kiel movado kaj rimedo por justa, paca kaj daŭripova multlingveco tutmonde.<br>**Ĉefa rimedo:**<br>CED – profesieca esplora-dokumenta fako de UEA, kun fokuso al lingva justeco kaj amas-komunikila strategio.<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Indekso de lingva justeco<br>• Nitobe-konferencoj<br>• Serio de lingvopolitikaj kaj kulturpolitikaj raportoj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Indekso: unua versio ellaborita por 34 OEKE-landoj (raporto en 2015)<br>• Konferencoj: minimume du, kun 30-50 prestiĝaj partoprenantoj<br>• Raportoj: 1-2 jare, diverslongaj, diverstemaj, eldonitaj rete kaj prese | **Strategia vizio:**<br>UEA – internacia bazo de la informa laboro kaj fonto de ĝisdataj, ĝustaj, modernstilaj informoj pri Esperanto en praktike ĉiuj lingvoj de la reto.<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Reta Komisiono pri Informado – novspeca komisiono kiu kunligas la plej aktivajn informaktivulojn ĉiulande.<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Du ampleksaj multlingvaj retpaĝaroj:<br>- uea.org, kun informoj pri UEA kaj ĝia agado, kaj<br>- esperanto.net, kun ĝeneralaj informoj pri Esperanto<br>• Monata reta novaĵbulteno abonebla<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Nombro de lingvoj (kresko ĝis 30)<br>• Paĝvizitoj (kresko ĝis 1.000.000 monate)<br>• Abonoj al monata bulteno (kresko ĝis 10.000) |

*7. Agadkampo Kapabligo*

7.1. Ĝenerale, en la lastaj jardekoj, UEA lasis la flegadon de ĉi tiu agadkampo (sub la etikedo "edukado") al la instruista asocio ILEI. Tiu aranĝo estas tamen strategie nepravigebla. La bonfarto de UEA, kaj de la movado ĝenerale, plene dependas de nia sukceso kapabligi la homojn uzi la lingvon aktive, ĝuste, klere, kaj ankaŭ kompetente partopreni sur la diversaj agadkampoj. Tial ni unue kaj prioritate rekomendas, ke la agado de ILEI estu plene integrita en la strukturo de UEA, inkluzive de la buĝeto de la Asocio kaj la laboro de la Centra Oficejo.

7.2. Krom ILEI, en la lastaj jaroj du retaj projektoj akiris grandan influon sur ĉi tiu agadkampo: lernu.net kaj edukado.net. La unua estas multlingva paĝaro por la senpaga lernado de Esperanto; la dua estas grandega kolekto de rimedoj kaj informoj por Esperanto-instruistoj. Ambaŭ projektoj estis financataj de la usona fondaĵo ESF, kaj iom post iom ekhavis propran vivon pro la konstanta alfluado de novaj vizitantoj, registritaj uzantoj, kaj volontulaj kunlaborantoj. Kvankam okazas iom da kunlaboro inter ili kaj UEA, tiuj projektoj restas esence sendependaj. Laŭ nia vidpunkto, la strategio de UEA pri Kapabligo devus nepre inkluzivi ilin.

7.3. Por difini la formon de tiu integriĝo, necesos dialogo kun ILEI kaj la du retprojektoj surbaze de komunaj interesoj. Plej evidente, sur tiu tuta kampo mankas financaj rimedoj. Kvankam ambaŭ retaj projektoj havis iom da sukceso pri varbado de donacoj, enspezado per reklamoj kaj vendoj, kaj simile, tiuj enspezoj ne sufiĉis ĝis nun por pagi la daŭran teknikan prizorgadon kaj evoluigon de la paĝaroj; necesas daŭra subtenado flanke de ESF. ILEI, siavice, luktas kun buĝeto nesufiĉa por dungi eĉ unu oficiston. Do, kiel unua paŝo al integriĝo, ni proponas krei novan Fondumon (aŭ fondaĵon) por Klerigo kaj Kapabligo, sub la egido de UEA sed kun partopreno de ĉiuj kvar organizoj (aŭ eventuale kvin, kun ESF). La celo de la Fondumo estus arigi rimedojn por financi la agadon sur ĉi tiu laborkampo, laŭ komunaj prioritatoj kaj kun la intenco iom post iom krei integritan sistemon de kursoj, instruistoj, ekzamenoj, trejnado, konferencoj, retpaĝaroj kaj eldonaĵoj.

7.4. La internacia ekzamensistemo, kiun enkondukis UEA kaj edukado.net surbaze de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), prezentas modelon de sukcesa kunagado sur la kampo Kapabligo. Ni proponas ke la nombro de trapasintoj de la diversaj KER-niveloj estu unu el la bazaj taksiloj de progreso sur ĉi tiu kampo. Kelkaj pliaj eblecoj estas resumitaj en la ĉi-suba tabelo.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KAPABLIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:**<br>Fondumo por Klerigo kaj Kapabligo, kunlabore kun ILEI/ edukado.net/ lernu.net | **Strategia vizio:**<br>UEA – kleriga kaj aktiviga organizo por esperantistoj je ĉiuj niveloj, kun emfazo pri lingvaj kapabloj, movadaj scioj, interkultura komunikado<br><br>**Ĉefa rimedo:**<br>Funda reorganizo de la eduka/kleriga flanko de UEA, ekz. per Fondumo por Klerigo kaj Kapabligo, cele al longperspektiva integrigo kaj kunfinancado de ILEI, edukado.net kaj lernu.net<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Kursoj, seminarioj, aranĝoj por pli altaj niveloj de lingvo-uzado<br>• Eldonado kaj disvastigo de valoraj klerigaj verkoj en diversaj ĝenroj<br>• Instruista trejnado pri lingvo-instruado, interkultura komunikado, kultura klerigado por plenkreskuloj | **Strategia vizio:**<br>UEA – kanalo por konstanta alfluado de novaj esperantistoj tra retkursoj kaj retforumoj al surlokaj kursoj kaj kulturaj aranĝoj por parol- kaj kultur-kapabligo<br><br>**Ĉefa rimedo:**<br>Kunlabore kun edukado.net, lernu.net, kaj ILEI (ekz. kadre de la Fondumo), evoluigo de klerigaj kaj aktivigaj paĝaroj kaj rimedoj en la reto, kun forta ligiteco al eksterretaj agadoj kaj normoj<br><br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Daŭra evoluigo de retaj kursoj diversnivelaj kaj diversenhavaj<br>• Eksperimentado pri novspecaj kursoj kaj aranĝoj por retaj lernantoj<br>• Varbado por la KER-ekzamenoj kaj aliaj testoj de kulturaj konoj/lingvaj kapabloj |

| | | |
|---|---|---|
| | **Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Disvastigo de paroligaj/superaj kursaroj (ĝis 10 jare, diversregione)<br>• Eldonprogramo (4 titoloj jare, kresko ĝis 3000 vendoj jare)<br>• Novaj instruistoj (kresko ĝis 300 jare) | **Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Sukcesaj trapasoj de retaj kursoj je KER-nivelo B1 (kresko ĝis 5.000 jare)<br>• Partopreno de retaj lern-antoj en lokaj aranĝoj (kresko ĝis 2000 novaj jare)<br>• Sukcesaj ekzameniĝoj je KER niveloj B1, B2, C1 (ĝis 500 jare) |

### *8. Agadkampo Komunumo*

8.1. Esence, la strategio de UEA sur ĉi tiu kampo celas plivastigi la eblecojn de aktiva partopreno en la kultura vivo de la Esperanto-komunumo, kreante aŭ aŭspiciante projektojn kaj agadojn kiuj ebligas relative vastan partoprenon (aŭ estas geografie tre disvastigitaj) kaj ankaŭ

kvalite elstaras. Ni prenu kiel ekzemplon la Libroservon. Se oni konceptas ĝin ne nur kiel vendejon, sed kiel potencialan tutmondan komunumon de legantoj, muzikŝatantoj kaj simile, oni venas al tute alia koncepto pri ĝia retpaĝaro, kaj pri la kapablo de UEA konstante peri renkontiĝojn kun verkistoj, prelegojn, libroprezentojn, premiadojn kaj aliajn aranĝojn, ne nur en UK sed tutjare kaj en maniero alirebla por multe pli da homoj.

8.2. Tiu kultivado de mondaj retoj, projektoj kaj servoj surbaze de komunaj celoj kaj interesoj estu la kerna strategio de UEA sur ĉi tiu kampo. Por disvolvi kaj efektivigi tiun strategion, ni proponas krei novan Komisionon por Kultura Evoluigo, al kiu oni invitus kreantojn kaj aktivulojn el diversaj kulturaj sferoj (muziko, familioj, turismo, literaturo, scienco kaj tekniko, Vikipedio k.a.). Inter la taskoj de tiu Komisiono: kunlabori kun la Centra Oficejo pri la evoluigo de (memfinancaj) servoj al la komunumo; kontribui al la planado kaj organizado de tutmondaj kulturaj projektoj kiel Vikipedio; kunordigi kaj subteni la kunlaborantajn fakajn asociojn de UEA; kaj modernigi kaj ampleksigi la Delegitan Reton.

8.3. En tiu ĉi komunuma agado, kiel ankaŭ sur la aliaj agadkampoj, ni vidas graviĝantan rolon por la regionaj komisionoj (pri Azio, Afriko, Ameriko kaj simile). Pere de regionaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj (kursaroj kaj kunloĝadoj, konferencoj, lingvofoiroj, turneoj de muzikaj aŭ teatraj grupoj ktp), tiu regiona agado povas multe kontribui al la pliviglligo kaj pliriĉigo de la Esperanto-kulturo. Ni do antaŭvidas pli gravan lokon en la strukturo de UEA por la regionaj komisionoj, kaj, interalie, la ellaboron de regionaj strategioj por kultura evoluigo en proksima kunlaboro kun la Komisiono por Kultura Evoluigo. Kunlige kun tiu agado, necesas trovi manierojn kreskigi la amplekson kaj kvaliton de solidaraj helpagadoj inter esperantistoj trans ekonomiajn kaj politikajn dividojn – ekzemple inter eŭropanoj kaj afrikanoj, inter japanoj kaj vjetnamanoj, aŭ inter nord- kaj sud-amerikanoj.

8.4. Tiujn ideojn pri la agadkampo Komunumo resumas la ĉi-suba tabelo.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KOMUNUMO**<br><br>**Kunordiga instanco:**<br>Komisiono por Kultura Evoluigo, kunlabore kun la Roterdama CO, la regionaj komisionoj, kaj la fakaj asocioj | **Strategia vizio:**<br>UEA – asocio por partoprenema, aĉetema, kreema publiko sur diversaj kulturaj kaj fakaj kampoj; portanto kaj evoluiganto de la esperantista idearo.<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Regionaj komisionoj – pli ampleksa kunordiga/ inspira/ organiza rolo pri regionaj kongresoj, kulturfestivaloj, konferencoj, lingvofoiroj ktp; simila rolo por kelkaj fakaj asocioj.<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Komuna strategio pri regionaj kongresoj: programeroj, financado, teknika subteno, reklamado k.s.<br>• Komuna strategio pri lingvofoiroj, konferencoj, kaj aliaj kulturaj prezentoj je regiona nivelo<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Kresko de partopreno en regionaj kongresoj<br>• Kresko de vendoj de kulturaj varoj<br>• Pli multaj kaj pli profesiaj kulturaj prezentoj en ĉiu regiono | **Strategia vizio:**<br>UEA – faciliganto de internaciaj projektoj sur la kampoj de kulturo, naturaj kaj homsciencoj, edukado, ekonomio, naturprotektado, solidara helpo k.s.<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Komisiono por Kultura Evoluigo – nova komisiono i.a. por la elstarigo kaj antaŭenigo de kelkaj grandaj partoprenigaj projektoj en la reto.<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Plivastigo de la Libroservo al plenfunkcia reta vendejo kaj komunumo de uzantoj, kun aldono de recenzoj, komentoj, forumoj k.s.<br>• Daŭra pliriĉigado kaj plivastigo de Vikipedio, inkuzive de projekto Vizaĝoj<br>• Kreo de retejo por faciligi solidarecajn rilatojn inter esperantistoj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Kresko de retaj vendoj kaj uzantoj de la reta komunumo de la Libroservo<br>• Ĝis 20.000 novaj vikipediaj artikoloj jare, inkl. 400 pri Vizaĝoj<br>• Kresko de perretaj donacoj kaj subten-agoj |

***9. Agadkampo Kunordigo***

9.1. Al ni estas evidente, ke la nuna strukturo de la gvidorganoj de UEA ne estas adekvata al la strategiaj bezonoj skizitaj en ĉi tiu dokumento. La Komitato, la supera organo de UEA kiu fiksas la buĝeton, elektas la Estraron, kaj respondecas pri la Statuto kaj regularoj, kunsidas nur iom pli ol dek horojn jare, kaj apenaŭ aktivas inter la kongresoj (kvankam unuopaj komitatanoj, kompreneble, povas esti tre aktivaj). La Estraro, siaflanke, ja aktivas tra la jaro, sed kun nur 6-7 volontulaj anoj alfrontas vastan taskaron kiu pli taŭgus por sama nombro de plentempaj oficistoj. Ni ne povas imagi, ke la programon proponitan ĉi tie eblus kunordigi en tiaj kondiĉoj.

9.2. Kiel komenca paŝo al plibonigo, ni rekomendas ke la Estraro ne plu funkciu kiel sola decidantaro inter la kongresoj, sed kunordigante pli grandan grupon de aktivaj komitatanoj (ĉ. 20), elektitaj laŭ diversaj kriterioj inkluzive de pruvita aktiveco sur la ĉefaj agadkampoj de UEA, regiona reprezentado, kaj specialaj scioj aŭ laborpreteco. Tiu pli granda grupo, kiun ni proponas nomi la Konsilio aŭ la Kunordiga Komisiono de UEA, plene dividus la taskaron de la Estraro kaj respondecus pri la disvolvado kaj efektivigo de la strategio sur ĉiuj agadkampoj. Ĉiu estrarano do gvidus pli grandan teamon de homoj, kiuj estus bone informitaj pri la tuta gamo de agadoj kaj strukturoj en UEA, eĉ se ĉiu dediĉus sin al nur unu difinita tasko aŭ agadkampo. Ĝiaj anoj estus en konstanta kontakto inter si kaj formalaj plenkunsidoj okazus kelkfoje jare (ekzemple ĉiun duan aŭ trian monaton), per utiligo de diversaj retaj kaj aliaj teknikaj rimedoj.

9.3. La kreo aŭ restrukturigo de la aliaj organizaj rimedoj menciitaj en ĉi tiu raporto ankaŭ tuŝas la kampon Kunordigo, kaj kelkaj — ekzemple la plifortigo de la regionaj komisionoj — povus konduki al ŝanĝoj ankaŭ en la kernaj organoj de UEA. Ni opinias, ke verŝajne post du aŭ tri jaroj la realigado de ĉi tiu strategio kreos kondiĉojn por revizio de la Statuto de UEA. Ĝis tiu tempo, la Asocio devas esti preta kuraĝe eksperimenti kun novaj formoj de kunlaboro, inkluzive de diversaj retaj rimedoj por faciligi interkomunikadon kaj decidadon. Ekzemple, ankaŭ la Delegita Reto povus ludi multe pli aktivan rolon en la vivo de la Asocio, se anstataŭ Jarlibro la delegitoj ricevus aliron al socia retejo, per kiu ili povus facilege kontakti

unu la alian, kundiskuti kaj kunlabori, kaj kontribui al diversaj projektoj kaj agadoj de UEA.

9.4. Evidente la praktikaj sekvoj de ĉi tiu strategio por la Centra Oficejo estas tre zorge esplorendaj, en kunlaboro kun la Ĝenerala Direktoro kaj aliaj oficistoj. Ni antaŭvidas, ke ĝia efektivigo postulus signifan investon en la teknika kaj homa kapacito de la Oficejo, kaj rilatojn de reciproka fido kaj subteno inter la Oficejo, Konsilio (aŭ Kunordiga Komisiono) kaj Estraro. Strategia laborplano por la kampo Kunordigo nepre atentu tiun principon kaj prefere estu ellaborata kunlabore kun la Oficejo mem.

9.5. En la ĉi-suba tabelo [vidu paĝon 26] ni resumas ĉi tiujn ideojn pri la agadkampo Kunordigo.

### *10. Sekvaj paŝoj*

10.1. Kiel dirite en la komenco, ni celas per ĉi tiu dokumento stimuli kunpensadon kaj kundiskutadon. Strategio, kiel lingvo, ne konsistas nur el surpapera plano; kiel Esperanto mem, ĝi ekvivas en la koroj kaj mensoj de la homoj, kiuj elektas kredi je ĝi kaj utiligi ĝin diversmaniere kaj diverscele.

10.2. Ĉi-dokumente temas pri superrigardo de la strategia situacio de UEA, do pri analizo de la ĉefaj agadoj kaj bezonoj. Tio donas kadron por la ellaboro de pli konkretaj strategioj sur la diversaj agadkampoj. Laŭ ni, indas ĉefe fokusi la diskutojn al tio – t.e. kiajn konkretajn bezonojn vi vidas por plibonigi difinitan agadkampon en via urbo aŭ lando, via fako aŭ interes-sfero. Kiel la diversaj rimedoj kaj prioritatoj, identigitaj en ĉi tiu raporto, povas respondi al tiuj bezonoj? Kiel niaj diversaj agadkampoj kaj la tuta bunteco de niaj organizoj kaj tradicioj povas kompletigi kaj riĉigi unu la alian? Tiuj demandoj meritas la atenton kaj krean ideadon de ni ĉiuj.

10.3. La Komisiono pri Strategiaj Demandoj bonvenigas konstruan kritikon kaj kunlaboron. Precipe interesaj estas reagoj de grupoj kaj asocioj surbaze de iom vasta diskuto; sed ankaŭ informitaj komentoj kaj proponoj de unuopuloj estas bonvenaj. Reagojn bonvolu sendi al la adreso strategia.vizio@co.uea.org, nepre kun la nomoj kaj retadresoj de la kontribuintoj por faciligi respondon.

| | ĜENERALA STRATEGIO | RETA EVOLUIGO |
|---|---|---|
| **KUNORDIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:**<br>Nova Konsilio aŭ Kunordiga Komisiono de UEA, kunlabore kun la Estraro kaj Centra Oficejo | **Strategia vizio:**<br>UEA – organiza kadro por strategie konscia, harmonia kunlaboro de multegaj aktivuloj diversnivele kaj tutmonde, kun kontenta kaj efika profesia stabo kaj klara divido de respondecoj<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Diversaj organizaj rimedoj listigitaj sub la aliaj agadkampoj. Aldona novigo estas la kreo de ĉ. 20-kapa Konsilio kiu inkluzivas la Estraron kaj kunlaboras kun ĝi por organizi kaj gvidi la ĉefajn laborojn.<br><br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Plifortigo kaj disvastigo de landaj asocioj<br>• Kreskigo kaj aktivigo de individuaj membroj<br><br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>Vidu dekstre (samaj) | **Strategia vizio:**<br>UEA –peranto de informoj, kontaktoj kaj kunlaboro inter aktivaj esperantistoj ĉiulande por ĉiuspecaj celoj<br><br>**Ĉefa rimedo:**<br>Transformo de la Jarlibro kaj la Delegita Reto (eventuale ankaŭ Pasporta Servo) al rete konsultebla kaj redaktebla datumbazo de UEA (ligita al esperanto.tel aŭ uea.tel)<br><br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Investo en la kreo de tia datumbazo (eventuale kunlige kun ĝenerala renovigo de la datumsistemo de UEA)<br>• Eksperimentado pri novaj kategorioj de membro, delegito, aktivulo<br><br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Kresko de landaj asocioj kun almenaŭ 100 membroj (ĝis 80)<br>• Kresko de membraro (ĝis 8000)<br>• Kresko de Delegita Reto (ĝis 2000)<br>• Kresko de aktivularo (ĝis 3000) |

La Komisiono pri Strategiaj Demandoj konsistas el dek homoj elektitaj de la Komitato de UEA en Havano en 2010:

*Peter Balázs*
*Osmo Buller*
*Renato Corsetti*
*Loes Demmendaal*
*Mark Fettes (kunordiganto)*
*Stefan MacGill*
*Michael Boris Mandirola*
*Sonja Petrović-Lundberg*
*Ileana Schroder*
*José Antonio Vergara.*

## EspoDespo en kultura haveno

La 4-an de aŭgusto la bando EspoDespo ludis kadre de la granda kultura aranĝo "Kulturhavn" kiu okazadis en Islands Brygge, Kopenhago.

Feliĉe pluvis, tiel ke multaj vole-nevole devis aŭskulti la muzikon por ne malsekiĝi. Sed ŝajnas ke ili ne bedaŭris tion.



# *Esperantistoj gustumis la mondon*




*Kiel tradicie, DEA havis en budon en "Gustumu la Mondon", la tago por integriĝo de la komunumo de Kopenhago.*



*Jen dan-skota sakŝalma orkestro inaŭguras la tagon, marŝante laŭ Rantzausgade, kie la afero okazis.*




*Ankaŭ ĉi tie "EspoDespo" prezentis kantojn kaj muzikon.*